

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝinta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 ŝved. kr., 0.30 ŝv. fl., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3 1/2 pencol., 0.50 fr. aŭ belg. fl., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 6 germ. mk. (por balaj kaj balkanaj ŝtatoj), 3 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., 50 pol. mk., 200 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupono.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj — vidu sur paĝo 4! — Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpera alsendo sub banderolo — kostas por germanoj po numero 7 mk.

ET
kore salutas la kongresanojn kaj deziras
plenan sukceson
al la XIV-a.

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo)
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)
REDAKTOROJ:
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Butin.
Felletona red.: Zanoni.
ADMINISTREJO:
Horrem bei Köln, Germ.
Poŝtĉekkonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.
ANONCOJ
po cm², 0.10 ŝvisa franko (aŭ ĉe antaŭpago 6 gmk.)
Rabato laŭ interkonsento.

Numero 96 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 6. Aŭgusto 1922.

Bonvenon en Finnlando!

Helsinki,

la urbo de la XIV-a Kongreso de Esperanto.

Kion atendas fremdlandano, alvenante al la ĉefurbo de la lando de mil lagoj? Ĉu iajn strangajn dezertojn, kun blankaj ursoj kaj felvestitaj homoj? Ĉu eble urbon kun malnovaj kuriozaj domoj el ligno — Finnlando ja estas unu el la ĉefaj eksportoj de ligno — ĉe malvastaj, humokovritaj stratoj? Aŭ eble ian Venecion de la Nordo ĉe la bordoj de mil lagoj? En ĉiu okazo li seniluziĝos.

Estas prefere alveni sen iaj iluzioj, aŭ maksimume kun la penso, ke Helsinki verŝajne en grandaj trajtoj similas la hejmurbon de la alvenanto, kaj la seniluziĝo estos la plej malgranda.

Se vi volas vidi ion, kio realigus viajn iluziojn pri amaseto da lignaj domoj ĉe la limoj de homa kulturo, dometoj, kies enloĝantoj havus strangajn opiniojn pri sia burĝa indeco, en kontrasto kun la realaĵo malgranda „dorfo“ ĉe senfinaj arbaroj, vi devus havi transportilojn ankoraŭ ne elpensitajn, por veturi al la tempoj de fondo de la urbo — 1550, kaj spertajn pilotojn, kiuj montrus vojon al la interno de la golfo, ĝis la enfluejo de rivereto Vanda. Kaj se vi traveturus la tempojn per ekspresa vagonaro, vi baldaŭ mirus, ke la urbo ne emis kreskadon, eĉ komencis malkreski kaj venus ankoraŭ mirante, kie troviĝas la urbo.

Estis kulpo de la direktisto de via tempveturilo, kiu lasis vin restadi en sama loko tra ĉiuj tempoj. Kaj tiel la urbo en 1640 lasis vin kaj transiris al la duoninsulo, ĉirkaŭata de blua maro kaj verdaj insuloj, sur kiu nun kreskas la ĉefurbo de Finnlando.

Tiun titolon Helsinki tamen ne havis ankoraŭ en tiuj tempoj. Estis Abo-Turku, pli okcidente, pli proksime al la metropolo Stokholmo, kie la universitato estis fondita en la sama jaro, kiu translokiĝis Helsinkin, la portanto de tiu fiera titolo. Kaj Helsinki vegetis. La lignaj domoj elstaris el la tero unu apud la alia, intermite, kun longaj intertempoj — se ne okazis, ke brulego invadis la urbon kaj ĉion dezertigis — post kio la domoj ree kreskadis kvazaŭ fungoj post pluvo. Sed ian gravecon la urbo ne atingis dum jarcentoj.

Turniĝis folio de la historio. Stokholmo ne estis plu nia metropolo. Kaj la proksimeco de la Finlanda ĉefurbo al ĝi ne ŝajnis bona al potenculo. Abo perdis sian titolon. Kaj ĝin ricevis unu el la plej senmeritaj — Helsinki. La 19-a jarcento komenciĝis.

La administracioj translokiĝis. Baldaŭ sekvis la universitato. La urbo komencis kreskadon. Unue tio okazis tre malrapide. Ankoraŭ ĉ. 1870 oni trovis en preskaŭ centro de la urbo vidajojn tre strangajn al nuna Helsinkiano. Sed iom post iom ili malaperas. Anstataŭ la lignaj domoj ekstaris altaj, 4-5-6-etaĝaj domoj el brikoj. La duoninsulo fariĝas malvasta. Tion jam pruvas la fakto, ke oni komencas konstrui pli altajn. Sed tio ne sufiĉas. La urbo iom post iom almililitas teron de la maraj golfaj. La nuna centro de la urbo, kun stacidomo kaj la esplanadoj, staras sur antaŭa maro. Kaj iom post iom la loĝejoj etendiĝas al la radikoj de la duoninsulo, kun direkto al la kontinento. Verŝajne niaj nepoj jam vidos urbon ankoraŭ tie, kie Helsinki unue estis fondita, en la interno de la golfo.

Nun la urbo estas vasta kaj ŝajnas tiel firma kun siaj konstruaĵoj brikaĵ, parte kun fasadoj el granito, ke oni apenaŭ plu farus la demandon, kial ĝuste Helsinki fariĝis la ĉefurbo. Tamen post la supra historieto, tiu demando estas natura. Kaj oni estas preskaŭ tentata respondi, ke ne Helsinki fariĝis ĉefurbo, sed la ĉefurbo fariĝis Helsinki. Kaj ĝian lokon verŝajne difinis la forik-ajo Suomenlinna (Sveaborg), konstruita ĉi tie jam dum la dua duono de la 18-a jarcento, kiam ankoraŭ la ĉefurbo loĝis en Abo.

Sed kiel dirite, Helsinki — en la nuna senco de la vorto — ekzistas nur post kiam la ĉefurba titolo estis donita al ĝi. Ĝi estas eĉ ankoraŭ pli luna. Al turistoj, kiu alvenas ĉi tien, ĉu per fervojo, ĉu en ŝipo, ĝi prezentas sin kiel rezultato de la konstruaj laboroj de la 20 laste pasintaj



Panoramo de Helsinki, ĉefurbo de Finnlando, de la Suda Haveno.

De malproksima Oriento
Ĝis landoj sur Atlanta bord',
Popolo ĉiu, ĉiu gento —
Bonvenu en somera Nord'!
En lando, kie noktoj lumas,
Por vidi: jen la sun' noktumas.

Jen vidos vi: la viv' ne mortas
Dum vintro de l' poluso, ne!
Silente froston ĝi elportas
— Kaj en printempo floras re.
La vintro eĉ nur florojn servas
— Car semojn ĝi sub neg' konservas.

De malproksima Oriento
Ĝis landoj sur Atlanta bord',
Popolo ĉiu, ĉiu gento —
Bonvenu en somera Nord'!
La verdajn bordojn de l' millagoj
Invadu vi kun verdaj flagoj! J. L.

Rigide kuŝis la rivero,
La lago dormis sub glaci';
Revenas varmo kaj libero.
— Ho, aŭdu, kia ĝojokri':
„Salut' al suno, blucielo,
Al nova vivo, verda belo!“

„Salut' al verdo!“ — vivkoloro.
La homojn vokas ĝia dir',
Ĝi vokas: „Venu al laboro,
Kaj al semado ĉiu vir'!
La teron jam moligis suno —
Rikolton donos la aŭtuno!“

jaroj. Kaj eĉ al vera Helsinkiano la urbo estas ĉefe tiu sama junulo.

La junulo estis forte kreskanta antaŭ la milito. Nun kompreneble la konstrua industrio ankoraŭ ne atingis la evoluon antaŭmilitan, kaj pro tio multo aspektas nepreta, komencita sed nefinita kaj kvazaŭ ripozanta. Tio certe frapas la vizitantojn, kiam ili meze de la plej moderna centro de la urbo subite vidas iun malgrandan lignan dometon kun unu sola etaĝo, aŭ iun placon meze de palacoj kun malegala, malkomforte irebla pavimo. Aŭ iun parkon preskaŭ sovaĝiĝintan. En tiaj okazoj, ne kritiku tro severe la junulon.

Helsinki estas la plej granda urbo de la lando, kun ĉ. 200000 loĝantoj. Ĉiuj aliaj urboj de Finnlando kune apenaŭ atingas la duoblon de tiu nombro, kaj la tuta loĝantaro de la lando ne la 20-oblon. Sekvas el tio kompreneble, ke la spirita vivo de la tuta lando koncentriĝas ĉi tie. Universitato — la sola ĝis la lastaj jaroj —, teknika altlernejo, mezaj modellernejoj, muzeoj, artkolektoj, sciencaj kaj artaj societoj, bibliotekoj, libroeldonejoj ktp., ĉiuj kontribuas al la centrigo. Eĉ kiel industria kaj komerca urbo Helsinki estas la ĉefa en la lando. Kion Finnlando povas prestiĝi kulture, tio estas ĉio renkontebla ĉi tie.

Kio koncernas la naturon de la urbo, la Helsinkiano, se nur liaj rimedoj tion permesas, preferas forlasi la urbon dum somero, kaj konas nur

ĝian vintron kun la malsekaj, trapenetrantaj marventoj dum akra frostoj. Kaj tial Helsinkiano apenaŭ scias, ke lia urbo prezentas ankaŭ ion, kaj kun sufiĉa reputacio, de la naturo de la lando kun cent mil verdaj insuloj.

Preter tiuj insuloj, tra la markoloj inter ili, glitas la ŝipo, en kiu vi, estimataj kongresanoj, alvenas. Jam je longa distanco vi rimarkas kelkajn pintojn akrajn, aliajn rondajn, altiĝantajn super la supron de la domoj. La turoj de kelkaj preĝejoj, antaŭ ĉio la kupoloj de la katedralo de Nikolao distingiĝas. La ŝipo eniras ĝis la centro de la urbo, en la sudan havenon, kie vi devas trairi malgrandan doganpavilonon. Ne rapidu, bonvolu! Lasu la malkvietulojn iri antaŭe, kaj jetu intertempe rigardon al la ĉirkaŭaĵoj. Jen sur insuleto malgranda pavilono de jaktoklubo, kun aro da boatoj, kaj sur alia ŝatata somerrestoracio Luoto-Klippan. Kontraŭ ili altiĝas kun abundaj foliaroj, arbustoj, arboj, la observejo monto kaj sur ĝia kulmino la Astronomia Observejo. Antaŭ vi estas la komerca placo — vendejo de la fiŝkaptistoj de l' arkipelago — ĉe ĝiaj randoj kelkaj vendohaloj, ankaŭ grandparte por la fiŝkomerco, kaj iom pli dekstre la malalta, modesta kastelo de la prezidanto de la Respubliko. Dekstre ĝin alte superas ortodoksa preĝejo, nun post la sendependiĝo de nia lando perdinta la gravecon, kiun ĝi ĝuis dum la tempoj de rusa potenco. Pli maldekstre, meze de la haveno, trans la placo

kaj la urbodomu, la rigardo revenas al la harmoniaj rondaj kupoloj de luterana katedralo Nikolao. — La haveno mem estas plena, kun flagoj el ĉiuj mondpartoj, kaj lam tro malvasta. Sur la okcidenta bordo oni jam laboras fervore por konstrui novan, pli vastan kaj modernan havenon (en Hietalahti).

Elirinte el la ŝipo ni direktas la paŝojn al la malnova parlamentejo (Etata Domo, Säädytalo), kie troviĝas la Kongresa Akceptejo. Ni transiras la komercplacon, trairas malgrandan straton kaj estas tuj sur la Regisara Placo (Hallitustori, Senaatintori). Haltu tie momenton por atenti al la jam nomita Nikolao katedralo sur ĝiaj imponaj, eĉ tro grandaj ŝtuparoj. Dekstre staras la palaco de la Registaro, maldekstre la Universitato kaj malantaŭ ni la urbodomu, ĉiuj konstruitaj de arkitekto J. C. L. Engel dum la unua duono de la 19-a jarcento. Ĉi tio estas la kerno de la „malnova“ Helsinki, kun sia simpla, serioza stilo devenanta de la antikvaj majstroj — Meze de la placo staras monumento de Aleksandro II-a, imperiestro grandduko, kiu estis alte respektata de la finnoj pro tio, ke li volis juste kaj lojale konservi niajn rajtojn kiel aŭtonomia parto de tiama Ruslando. Ĉirkaŭiru la monumenton! Jen la knabino Finnlando protektata de la fidela leono — la leĝo; oriente la scienco kaj arto — la lumo; okcidente vira kaj virino kun rikoltoj — la laboro; norde — la paco.

Jetinte rigardon al la Universitata Biblioteko krucu kontraŭ la Universitato kaj la Nikolao katedralo — unu el la plej artaj konstruaĵoj de J. C. L. Engel —, ni lasas la placon kaj rapidas inter la ĉefpoŝtejo kaj unu el la universitataj institucioj — kemiaj kaj mineralogiaj laborejoj kaj skulptalkolekto — al malgranda placeto iom pli norde. La Finlanda Ŝtatbanko kaj Publika Arkivejo baras ĝin de du flankoj, okcidente kaj norde, sed ni eniras orienten, en la Etatan Domon, kies portalo estas ornamita per la standardo de ĉiuj nacioj. Vi devas ricevi la kongresan insignon, diversajn informojn ktp., kaj por tiu tempo ni lasas vin libera.

Ni havas du vojojn por elekti. Aŭ ni reiras al la Registara Placo kaj de tie preter la Parlamentejo — kie espereble okazos la laborkunsidejoj (tute nova konstruaĵo) al la Stacia Placo. Aŭ ni daŭrigas la vojon norden, turnas nin okcidenten kaj trairas la parkon Kaisaniemi kaj venas al la nomita placo preter la Finna Nacia Teatro — impona konstruaĵo kun fasado el natura ŝtono. La malfermo de la kongreso okazos ĉi tie. Kontraŭ ĝi ni vidas la artkolektejon „Ateneo“, en kiu ĉiuj finnaj skulptistoj kaj pentristoj ricevis almenaŭ sian unuan edukon, kaj dekstre la novan stacidomon de Helsinki, la mirindan konstruaĵon de nia mond fama Saarinen, kun siaj longegaj fasadoj simplaj kaj modestaj, kiuj tamen neniel impresas kazerne. Tiu konstruaĵo vi nepre devas vidi ankaŭ interne, eĉ se vi ne intencas fervoje veturi. Estas en ĝia tuta stilo io aparte finlanda, karakteriza al nia popolo kaj ĝia kulturo. La majestaj arkajoj de ĝiaj salonoj elvokas ian senton de harmonio kaj pleco, simile al la alpinaroj ruĝatrunkaj malproksime de urba bruoj. Kaj ĝi estas nur stacidomo.

Aliflanke staras kelkaj novaj komercejoj, kiuj bone reprezentas per sia eksteraĵo nuntempan finlandan arkitekturon.

Sed ni lasu la Stacian Placon kaj iru al la Henrika Esplanado. Tie meritas nian atenton nova, impona domo de la vivasekura societo Kaleva — unu parto de la domo estas luita al la unuaranga hotelo „Societelo“, kie multaj kongresanoj trovas luksajn ĉambrojn por la semajno. Post ĝi staras la du domoj posedataj de universitata studentaro — nia studentaro estas milionulo! — En la pli malnova el ili, kiun „Spei suae patria dedit“ (la patrolando donacis al sia espero), estas bonaj festsalonoj, taŭgaj por kelkaj festoj de la XIV-a. En la nova, kiun „la espero mem konstruis al si“, estas kunvenejoj de la studentaj korporacioj. Se vi povas akiri permeson eniri, ne forgesu tion fari!

Iom pli oriente staras ankoraŭ domo de vivasekura societo — la plej granda en Nord-

Eŭropo — portanta la nomon de nia lando „Suomi“ — ĝi ankaŭ meritas atenton de persono, kiu ŝatas studi la graniĝasadan arkitekturon de Finnlando, ĝian sobran stilon kun simplaj ornamantoj de grandaj trajtoj. Post ĝi estas trovebla la monumento-rememorigaĵo al nia nacia epopeo Kalevala kaj ĝia kolektinto Lönnrot.

Tie ludas Väinämöinen,
La eterna praktikanto,
Akompanas sian kanton
Per kantelo ezokosta
Eĉ aero ĝojon sentas.

Lin aŭskultas Lönnrot kun krajono kaj papero, kaj apude staras la virgino de aero, kiu donacis siajn harojn kiel kordojn de l' kantelo.

Tra la parkon de malnova, ligna preĝejo al la Bulvaroj kaj orienten al la Runeberga Esplanado. La placo de Erotajia per sia kruteta deklivo montras al ni bone, sur kiel monta tereno la urbo estas konstruita. En la komenco de la Esplanado staras la Sveda Teatro kun la restoracio „Opera Kelo“, eble la sola enurba restoracio, kiu havas tablojn sub ĉielo en la parko. Meze staras la monumento de Runeberg, ofte nomata nia nacia poeto, ĉar li kantis finne, kvankam per sveda lingvo. La statuo estas skulptita de Walter Runeberg, filo de la poeto.

Preter la restoracio „Kapelo“, antaŭ kiu ludas muziko simile kiel antaŭ la „Opera Kelo“, kaj preter la fontano de Vallgren ni revenas al la granda komerca placo en suda haveno. Sed antaŭ ol ni lasas la esplanadon ni atentis, ke ankaŭ ĉi tie, en la kerno de la urbo, troviĝas ankoraŭ kelkaj malaltaj dometoj el ligno inter la imponemaj komercpalacoj — ankoraŭ signo pri la juneco de nia urbo. Certe, p'anoj por la rekonstruo de ĉio ekzistas, sed intervenis la milito kaj ĝiaj ekonomiaj sekvoj.

Nun estas nia celo la Observeja Monto, por ricevi panoramon super la centro de la urbo kun ĝiaj havenoj kaj ĉirkaŭanta insularo. La monto estas nur parko, iom sovaĝa kaj nezorgita, rilate al la antaŭmilita stato, sed tamen alloga kun siaj foliirĉaj laŭboj. Bela vidaĵo antaŭ ĉio ĉe la skulptaĵo de Stigell, „la ŝippereantoj“ — alegoria bildo pri la agonio de finna nacio dum la pasinta subpremo de Ruslando; la viro svingas per sia tuko kaj kriis pri helpo kun vizaĝo turnita al la okcidento.

Kaj nun ni povas lasi al vi mem fari programon por daŭrigi la rigardon de la urbo. Nur unu rimarkigo ankoraŭ: ne forgesu supreniri en la turon de fajrobriĝadejo por ricevi birdperspektivon vere vidindan. Kaj ankaŭ nepre vizitu ĉi tie la parkojn Kalvopulisto, Korkeasaari (kun malgranda zoologia ĝardeno, enlandaĵ bestoj), Munkkiniemi, Seuraasaari (kun subĉiela etnografia muzeo), Kuloasaari-Brändö ktp.

Kaj nun vi estas ĵetinta kelkajn rigardojn al la eksteraĵo de nuntempa Finnlanda kulturo kaj naturo. Se vi volas enprofundiĝi en ĉi tiun vojaĝon al la eksteraĵo!

Sed ties priskribo apartenas al la ĵus aperinta libro „Vojaĝado en Finnlando.“*)

*) Ricevebla de la LKK de la Kongreso. Prezo 5 fmk.

Komerco.

Wilhelmshaven-Rüstringen (Germ.).

De 11.—25. junio okazis en nia duobla urbo komerca kaj industria ekspozicio. La lokaj Esperantistaj grupoj — „Jadegolfo“ kaj Laborista Grupo — uzis la okazon, montri nian lingvon kiel lingvon de la internacia komerco kaj industrio. La celkonscia propagando atentigis la komercajn rondojn pri Esperanto. Sinsekve deĵoris la anoj de „Jadegolfo“ kaj Laborista Grupo, klarigante la signifon de Esperanto kaj ĝian kreskantan disvastiĝon en ĉiuj fakoj de la homa okupado. Personaj klopodoj de s-o Laib, del., konigi la organizon de UEA en komercaj rondoj, estis laŭde akceptataj. La tuta teritorio havis pli frue solan karakteron de militindustrio, kaj kaŭze de la packontrakto aliĝis je komercindustrio. La junaj entreprenoj nur paŝon post paŝo akceptas novajn. Pro tio ni rikoltas la fruktojn de nia propagando nur iom post iom.

La 26. junio post fermo de la ekspozicio la grupo Jadegolfo malfermis kurson kun pli ol 30 partoprenantoj; la Laborista Grupo tian kun 20 partoprenantoj. Duan kurson „Jadegolfo“ komencos en oktobro. „Ni semas kaj semas konstante.“

„Internacia Mondliteraturo“

por la tutmonda Esperantistaro.

Kion ni devas legi?! Estas certe, ke ĉiu, iomete progresinte rilate la lernadon de „nia lingvo“, bezonas la legadon de internacia literaturo, ne tradukaĵojn el sia nacia literaturo. Nia principo ja estas: Kun niaj samnacionoj ni parolu la gepatran lingvon, kun alilandanoj Esperanton, la neŭtralan mondhelpingvon! Do, jam pro tio neniu volonte legos la verkojn de sia nacia literaturo Esperantigitajn. Eble li faros tion pro la lingva ekzercado, pro lingva intereso,

sed ne por havigi al si la ĝuon, kiun prezentas la originalo. Estas ankaŭ iomete danĝere, ĉiam legi Esperanto-tradukaĵojn de samnacionoj, ĉar tiamaŭ oni ne fariĝos tute lerta, perfekta Esperantisto, kiu scipovas eviti lingvajn naciismojn, tiamaniere oni ne akiras internacian stilon. Multe pli rekomendinda kaj preferinda estas la legado de verkoj, Esperantigitaj per samideanoj el aliaj nacioj. Sur ĉi tiu vojo nia stilo, nia vortfarado pliboniĝos, „nia Esperanto“ fariĝos vere internacia. Kaj: legante la verkojn de alinacionoj ni enpenetros en la literaturon, kulturon, kutimojn, movojn, vivon de aliaj popoloj. Tio estas nepre necesa, por ke ne nur eksterne, sed ankaŭ interne fariĝu homoj „homaranecaj“, kiuj povas senti kaj pensi kun la homoj de aliaj popoloj.

Dum la Genève-a konferenco mi jam publike — kaj konsentite de ĉiuj ĉeestantoj — aludis la necesecon, krei entreprenon, per kiu ni povas ricevi por niaj kursoj, por niaj lernejoj, por niaj propraj liberaj horoj la plej bonajn verkojn de aliaj nacioj, bone Esperantigitajn.

Bedaŭrinde la fame konata firmao Hachette & Cie. en Paris ne plu eldonas Esperantaĵojn. Des pli salutinda estas la cirkonstanco, ke unu de la plej grandaj germanaj eldonejoj, la firmao Hirt & Sohn en Leipzig, montras grandan intereson por nia movado; ĝi jam eldonis bonajn Esperantaĵojn kaj ĝi jam antaŭ kelkaj monatoj konsentis mian planon, krei specialan fakon por „Internacia Mond-



George Černohostov.



K. Sev. Ahonius, vicepresidanto.



Albin Sandström, pr. zidanto.



Leo Jalava, kasisto.



Vilho Setälä, sekretario.

LA FERVORA

LOKA KONGRESA KOMITATO DE LA DEKKVARA

literaturo“. Mi proponis jenajn principojn:

1. Oni akceptu nur verkojn, kiuj estas vere valoraj de sur literara vidpunkto! Ĉu tiu verko estas, ĉi, pri tio decidu la samnacionoj mem de la elektota verkisto.
2. Oni komisiu la tradukon de tiu ajn verko nur al ano de la sama nacio, al kies literaturo la verko apartenas!
3. Oni zorgu, ke kiel eble plej multaj — se eble ĉiuj civilizitaj — nacioj estu reprezentataj en la entrepreno de „Internacia Mondliteraturo“!
4. Oni komence elektu — por atingi la celon de la 3-a punkto — ne tro longajn verkojn!
5. Oni eldonu en unu volumo nur verkojn de unu aŭtoro kaj nomu la volumon laŭ li, ne laŭ la tradukinto, kio ŝajnas al mi tre malprobinda kutimo.
6. Oni komence ne entreprenu tro multon, t. e. oni ne traduku ĉiusepacajn verkojn, sed — tion mi proponas por la nuna stato de nia movado — nur beletristikajn verkojn, ekz. novelojn, rakontojn, mallongajn romanojn k. c. Pli malfrue oni ja povas decidi pri la traduko de ekz. ĉiusepacaj sciencaj verkoj k. a. —

La firmao Hirt & Sohn komisiis min, kiel direktoron de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, zorgi pri la efektivaĵo de la ideo de „Internacia Mondliteraturo“ por la tutmonda Esperantistaro.

Mi des pli volonte agos laŭ ĉi tiu komisiio, ĉar mi mem jam de longa tempo treege deziris tian entreprenon. Ni celas per ĝi tute alion, ol kelkaj allandaj samideanoj, kiuj volas disvastigi la literaturon de sia propra lando, por disvastigi la kulturon de sia lando. Ankaŭ aprobinda entrepreno, sed tute malsama! Ni volas disvastigi la tutmondan kulturon per la literaturo de kiel eble plej multaj landoj. Pro tio mi ĝojas, se mi baldaŭ ricevos respondojn, ĉu samideanoj el ĉiuj negermanaj nacioj volas helpi, por ke ni ricevu el ĉiu popolo kaj ĉiu literaturo valorajn verkojn Esperantigitajn, taŭgajn por nia celo. Kompreneble la firmao laŭdece rekompencos la laboron de la tradukantoj.

Mi petas, ke ĉiuj, kiuj volas partopreni al nia laboro, nepre necesa por la Esperantistaro, anoncu sian nomon kaj samtempe skribu, kion ili volas traduki. Estas plue rekomendinde, ke ili (se ili ne jam estas konataj kiel lertaj tradukistoj) kaj Esperanto-stilistoj) poste sendu parton de sia tradukaĵo, laŭ kiu oni povas juĝi pri ilia lerteco; ĉar ni povas akcepti nur bonajn tradukaĵojn. Sed certe en ĉiu nacio troviĝas sufiĉe da tiaj tradukistoj. Ĝis nun ni jam ricevis promesojn de kunlaborantoj el diversaj landoj. Helpe, por ke ni baldaŭ havu vere „internacian“ kolekton, kolekton reprezentantan ĉiujn naciojn.

Profesoro D-ro Dietherle,
Direktoro de la Esperanto-Instituto por la
Germana Respubliko.

Pri U. L. E.

Mi tute ne deziras ofendi la partianojn de l' projekto de la „Universala Ligo Esperantista“, ĉar mi tion tre bone komprenas, ke ĉiu el ni deziras labori por prospero de nia afero, tamen mi kuraĝas insisti, ke ni ne bezonas tielajn reformojn kiel la Direktorio (Generala Komitato) kaj ministraron (Direktanta Komitato), sed ni bezonas ion alian. Nia libera Esperantio, kiu travivis la heroajn tempojn de la kreado, tute ne bezonas mortigi la instituciojn, al kiuj ĝi ŝuldas sian nuntempan forton kaj prosperon. Ni devas reformi ne niajn instituciojn sed nin mem kaj nian rilaton al la „afero“.

Ni devas fine konjekti, ke ĉiam kreskanta nia movado bezonas ĉiam pli grandan elspezsumon kaj ankaŭ, ke pro troŝanĝitaj, postmilitaj vivkondiĉoj, nia afero povas trosuferi, se ni ne tuj entreprenos la sanigadon.

Ni devas plifortigi nian financon — ĝi estas la plejgravaĵo. Sen tio ni nenion realigos. Sen tio eĉ niaj projektoj restos ĉiam sentemperamentaj, anemiat, kancelariaj ellaboraĵoj.

Ni, kiuj pretendas esti apostoloj de „Nova Sento“, ni, kiuj tiam ĉagrenas pri indiferenteco kaj „obstinaj baroj“, ni nin ne ĝenas tro per la zorgoj pri la plej baldaŭa falo de la baroj.

Por ne forpreni tro da tempo kaj loko, mi ne kritikos la projekton de la Ligo po-parte, laŭparagrafe,

sed mi tuj prezentos al afabla atento de samideanoj jenajn modestajn proponojn:

1. Per ĉiuj fortoj helpi la UEA, kiu nin brile servis en tre malfavoraj cirkonstancoj, kaj nun velkas, ne pro malbona organizo aŭ malbona mastrumado, sed pro manko de monrimedoj. Ĝi povas esti bonega nia reprezentanto kaj peranto antaŭ oficialaj medioj kaj institucioj de diversaj landoj.
 2. Per ĉiuj rimedoj subteni la C. O., kiu ankaŭ ĝis nun laboris plej perfekte, por ke ĝi havu eblon ĉiam liveri por nia kreskanta movado precizajn plej kompletajn statistikojn kaj informojn.
 3. Plifortigi, plivigligi la vivadon de L. K., ĉar por nia precipe, ĉefe „lingva afero“ ĝi estas nia plej grava institucio, ĝi estas nia parlamento.
 4. Lasi netuŝebla K. K. K.-on, ĉar ĝi zorgas pri brilo de nia standardo antaŭ la mondo laika, kaj ĉiam indus laŭdojn kaj scias digne nin reprezenti.
 5. Fondi la Centran Kason, kies tasko estos trovi la monrimedojn, administri kaj distribui ilin inter niajn instituciojn ekzistantajn (eventuale: ekzistantajn). Statuto de C. K. neniel devas lezi la suverenecon de aliaj institucioj.
- Kaj fine, se ni nepre bezonas la Tutmondan Ligon:
6. Por harmonia agado kaj komuna interhelpo fondi „Ligon de la Ligoj“, kiu devus kunigi ĉiujn organizitajn jam Naciajn Ligojn.

Tiacele ĉiu lando elektus tri delegitojn (unu de societoj, unu de izoluloj, kaj la trian elektus la du elektituloj). Ili estus sendataj ĉiujare (je la kosto de la nacia ligo) al ligo-delegita kongreso okazadanta du—tri tagojn antaŭ nia Universala Kongreso en la sama urbo. La delegitoj referus, diskutus kaj voĉdone decidus la komisiitajn projektojn. Projekto estus rajte komisiita se a) 2 enlandaj societoj ĝin prezentas, b) dek izoluloj, c) ajna projekto unuanime akceptita de ĉiuj tri delegitoj, d) projekto de neniu komisiita, naskiĝinta dum kongreso, kies diskuton postulus triono de ĉeestantaj delegitoj.

M. Kalina.

Lernejo.

En Dresden (Germ.) 1200 geknaboj anoncis sin por Esp. kursoj.

Okazas 36 kursoj por infanoj.

Bela pruvo por la efiko de bone organizita propagando estas la granda sukceso inter la Dresdena lernantaro de urbaĵo popollernejoj. La distrikto Dresden de Lab. Esp. Asocio, la Loka Societo Dresden de GEA kaj la subfako „Esperanto“ de la „Fremdlingva Sekcio“ en „Dresdner Lehrverein“ unuigis por komuna propagando en la Dresdenaj lernejoj. Oni igis disdoni flugfoliojn kun aliĝiloj inter la lernantaro de la 6-a kaj 7-a lernjaroj. Post unu semajno la gelnstruistoj de la koncernaĵo klasoj kolektis la aliĝilojn;

Esp. laboristoj admonis ankaŭ prokrastemajn gepatrojn kaj kunvenigis mem la subskribojn. Kaj la sukceso estis jena: aliĝis preskaŭ 1200 geknaboj 11-13 jara, kiuj nun estas instruataj en 36 kursoj, okazantaj en la plej diversaj popollernejoj de la urbejo. La urba parlamento konsentis je la senpaga uzado de la klasejoj. Oni intencas nun, atingi la proksiman celon, ke la urba konsilantaro pagu mem la salajron al la instruistoj. Nuntempe la gepatroj pagas 80 gmk. por la tuta jaro (2 lecionoj dum unu semajno). — La 1-a prezidanto de la subfako „Esperanto“, instruisto Paul Höfer, Dresden-A, Wallwitzstr. 46, aŭ la 2-a prez., instr. Emil Friebe, Dresden-Dobritz, akceptos ĉiutempe proponojn pri postkartaĵo interrilatoj kun alilandaj gelernantoj.

Federacio de Esp. Societoj en Pollando.

Unua Komuniko.

La dum la 1-a Tutpola Esperanto-Kongreso en Varsovio elektita estraro de la Federacio konsistas el 6 Varsoviaj kaj 6 provincaj membroj. El Varsovio: Prof. D-ro Bujwid, D-ro Czubyński, s-o Domostawski, s-o Kesicki, s-o Lonkopolanski, f-ino D-ro Muszkatblat. El provinco: D-ro Fels, Lwów; s-o Kuhl, Kraków; s-o Lewandowski, Poznań; s-o Prengel, Bydgoszcz; s-o Wojciechowicz, Łódź; s-o Zys, Łódź. — La unua plenralta kunsido de la Federacia estraro, al kiu estis skribe invitataj ĉiuj provincaj estraranoj, decidis transdoni ĉiujn rajtojn kaj kompetentecojn de la Federacia estraro al la Varsovia ekzekutivo, konsistanta el sekvantaj Varsoviaj estraranoj: Prof.

D-ro Odo Bujwid, prezidanto; D-ro Antoni Czubyński; Kazimierz Domostawski (gvid. de organiza komisiiono); Roman Kesicki, kasisto; Edvardo Lonkopolanski (gvid. de instrua sekcio); D-ro Paulina Muszkatblat, ĝenerala sekretarino.

La Pola Esperanto Instituto funkcias kiel memstara organizo de la Federacio. Ĝia estraro konsistas el: D-ro A. Czubyński, s-o M. Kaus, s-o E. Lonkopolanski (gvidanto).

La statuto de la Federacio estos post la lega ligo dissendata al ĉiuj aliĝintaj societoj.

La Varsoviaj estraranoj klopodas energie pri la ebleco efektiviĝi la decidon de la 1-a Tutpola Esp. Kongreso inviti la XV-an Internacian Esp. Kongreson al Varsovio.

Kiel oficiala organo de la Federacio estas elektita „Esperanto Triumfonta“, kie aperados ĉiuj komunikaĵoj de la Federacio.

La provizora adreso de la sekretariejo estas: Dr. Muszkatblat, Krochmalna 15, Warszawa.

D-ro Paulina Muszkatblat,
ĝenerala sekretarino.

La „Settlements“ Kongreso.

En Cliveden, belega loko apud Londono, kunvenis antaŭ nelonge delegitoj el Usono, Kanado, Japanujo kaj multaj landoj de Eŭropo por kongreso de „Settlements“.

„Settlements“ (angle) estas speco de malgranda kolonio de studentoj aŭ aliaj sinferemuloj, vivantaj kelkatempe — vice — en domo de malriĉaj kvartaloj de ia urbo por helpi instrui aŭ konsili kaj influi la loĝantojn, iel anstataŭigante la religiajn domojn de la katolikoj.

Tiaj „settlements“ troviĝas precipe en Anglujo kaj Usono.

S-ino Barnett, la prezidantino, resumante la farojn de la kongreso, diris, ke du gravaj pensoj restas en ŝia animo: Unue ŝi impresigis pri la sindonemo de la geanoj; due ŝi sin demandas, ĉu ilia idealismo ne devas esti pli alta, celanta efektiviĝi profundan ŝanĝon tiamaniere, ke ne plu ekzistos mizeruloj kaj ke ĉiu familio povos havi komfortan hejmon.

Dum la kongreso s-oj kapitano Reiss kaj D-ro Mactadyen klarigis la projektojn kaj klopodojn de la ĝardenurboj Letchworth kaj Welwyn, kie la tero ne povas esti posedata de individuo sed de la komuno; ili parolis pri la granda sukceso jam atingita per tiu rimedo por iom egaligi la mal-egalecon de l' sorto.

Kiu deziras scii detalojn pri la „Garden Cities“ (ĝardenurboj) de Letchworth aŭ Welwyn, skribu al D-ro Crowley, Welwyn, Herts, Anglujo.

Al ĉiuj hebreaj Esperantistoj.

Pro sufiĉe longdaŭra intertraktado kun unu el niaj plej fervoraj kaj laboremaj anoj, s-o Lejzerowicz el Łódź, bedaŭrinde montriĝinta senŝukca, pri edono de tiu ĉi cirkulero, nur nun ni povas sciigi kaj nur en mallongigita dimensio la plej gravajn aferojn de l' nunaj tagoj por la afero de fondo de TEHA.

La fonda kunsido estas okazonta dum la XIV-a Kongreso en Helsinki: La hebreaj Esperantistoj kunvenos samtempe kun aliaj laŭnaciaj

kunvenoj por elekti sian kongresan salutparolanton.

En la tagoj 9.—15. aŭg. la TEHA-anoj kunvenos en loko kaj tempo de ili fikso por decidi pri la statuto de TEHA, kiun la prov. ĝen. sekr. prezentos, mem ne povante ĉeesti, pere de unu el niaj asocioj. La tagordo: 1. Elektro de la kunsidaj prezidanto kaj sekretario. 2. Laŭleĝo de la statuto. 3. Diskuto pri la statuto. 4. Decido. 5. Fikso de la loko de la Asocia Centro. 6. Proponoj.

Ad 2. La statuto la subskribinto enmanigos en Danzig al la veterantaj Helsinkin TEHA-anoj. Ad 5. La subskribinto ne povos plu funkcii kiel ĝen. sekr. ĉar li forlasos Kraków post la ferio. Li proponas tamen restigi la Centrejon en Pollando, kie estas plej multaj TEHA-anoj, eble en Łódź.

Pri ĉiuj detaloj la subskribinto volonte parolos kun la TEHA-anoj en Danzig, helpante laŭeble al la partoprenantoj de la kongresa TEHA-kunsido. Ĝis nun alĝis 100 anoj el 12 landoj, la adresoj estas petebaj ĉe la Gvidejo ĝis la 25. aŭg. 1922. Kraków, la 21. VII. 1922.

Kun samideanaj salutoj
Leopold Dreher,
prov. hon. sekr. de TEHA.

Iom pri la finna lingvo.

La finnan lingvon oni legas precize kiel ĝi estas skribata. La akcento estas ĉiam sur la unua silabo.

Esperante.
Bonvolu havigi al mi
flakriston
portiston
aĉeti
akvo
apoteko
aŭtomobilo
banko
bileto
bona:
pli bona, malbona,
pli malbona.
bonvolu
botisto
ĉambro:
Donu al mi pli mal-
karan ĉambron.
Ĉu vi havas ĉambron?
dankon
dormi:
Mi volas dormi.
eniro:
Eniro malpermesita.
fermita:
fermita, malfermita.
flakristo
fruktvendejo
gastejo
gazeto
havigi:
bonvolu havigi al mi.

Suomeksi.
Olkaa hyvä ja hankkikaa
minulle
ajuri
kantaja
ostaa
vesi
apteekki
auto
pankki
piletit, lippu
hyvä:
parempi, huono,
huonompi.
olkaa hyvä
suutari
huone:
Antakaa minulle hal-
vempi huone.
Onko teillä huonetta?
kiitos
nukkua:
Tahdon nukkua.
pääsy:
Pääsy kielletty.
suljettu:
suljettu, avoinna
ajuri
hedelmäkauppa
vierasmaja
sanomalehti
hankkia:
olkaa hyvä ja hank-
kikaa minulle.
pysäkki
tuntit:
Paljonko kello on?
hotelli
mennä:
Minnä lähden, tulla,
mennä.
kahvila
maaseutu
tarjoilija
milloin?
missä:
Missä? Täällä. Tuolla
on.
juoksupoika, asiapoika
maksaa:
Paljonko maksaa?
lääkäri
pesä
lukusali
kirjakauppa
sairaala
raha:
Markka, penno
syöä:
Milloin syödään?
Aamiainen, päivälli-
nen, illallinen.
Kahvi, tee, maito, leipä,
voi, liha, kala, juusto,
kalja, sokeri, suola.

komisia knabo
kostas:
Kiom kostas?
kuracisto
lavi
legejo
librovendejo
malsanulejo
mono:
Marko, penno
manĝi:
Kiam oni manĝas?
Matenmaĝo, tag-
manĝo, vesper-
manĝo.
Kafo, teo, lakto, pano,
butero, viando, fiŝo,
fromaĝo, duonbiero,
sukero, salo.

muzeo
multe:
malmulte, multe.
naĝejo
numeraloj:
unu, du, tri, kvar, kvin,
ses, sep, ok, naŭ,
dek,
11
12
13 ktp.
20
30 ktp.
100
1000
1000000

pagi:
Mivolaspagi. Kalkulo.
peti:
Mi petas alumetojn
cigaretojn
akvon
mangajon
petu:
Petu kelneron, servist-
inon ĉi tien.
portisto
poŝto
preĝejo
razisto
sapo
sezono:
printempo; somero,
aŭtuno, vintro
servist(in)o
strato
stacio
sufiĉas:
sufiĉas jam.
tago:
tago, nokto, hodiaŭ,
hieraa, postmorgaŭ,
antaŭhieraa.
tajloro
tabakvendejo
tagon:
Bonan tagon. Adiaŭ.
tago:
lundo, mardo, mer-
kredo, ĵaŭdo, ven-
dredo, sabato,
dimanĉo.
telefono
telegrafejo
telegramo
tramvagono
urbo:
urbo, kamparo,
veku:
Veku min frue,
veturigi:
Veturigu al hotelo,
gastejo.
vendi
viŝtuko
maksaa:
Tahdon maksaa.
Lasku.
pyytää:
Pyydän tuliikkujä
savukkeita
vetää
ruokaa
pyytäkää:
Pyytäkää tarjoilija,
palvelijatar tänne.
kantaja
posti
kirrko
parturi
saippua
vuodenaika:
kevät, kesä, syksy,
talvi
palvelija(tar)
katu
asema
riittää:
riittää jo.
päivä:
päivä, yö, tänään, eilen,
ylihuomenna, tois-
sapäivänä.
rääli
tupakkakauppa
Hyvää päivää.
Hyvästi.
päivää:
maanantai, tiistai, kes-
kiviikko, torstai, per-
jantai, lauantai,
sunnuntai.
puhelin (telefooni)
lennätinlaitos
sähkösanoma
raittiotievaunu
kaupunki:
kaupunki, maaseutu,
herättäkää:
Herättäkää minut
varhain.
ajaa:
Ajakaa hotelliin,
matkailijakotiin.
myydä
pyyhe

II-a Rumanlanda Esp. Kongreso grandsukcesa

okazis la 8.—11. julio en Cluj (Kolozsvar, Klausenburg). Reĝino Maria salutis, Ministro de Publika Instruado s-o D-ro C. Angelescu kaj Ministro de Kultoj kaj Artoj s-o C. Banu protektis. Detalan raporton ilustratan ni publikigos en nia venonta numero.

Mallongaj Esp. Sciigoj.

En Lyon (Franc.).

La Grupo Esperantista de Lyon (fondita en 1902) ĵus festis per modesta ĝenerala kunsido la 20-an datrevenon de sia fondiĝo. Post alpenso alparolo de s-o Prof. Antonelli, prezidanto, pri la estonto de nia movado, s-o Poncet, help-sekretario, prezentis detalan skizon pri la historio de Esperanto en Lyon, memorigante niajn neforgeseblajn moriantojn (inter kiuj D-ro Henri Dor, Charles Bégel, Prof. Emile Cohendy, D-ro Prof. Henri Soulier) kaj honorigante la unuajn pionirojn (s-ino Ranfaing-Zablon d'Her, kiu lernis Esperanton en 1896 kaj post kelkaj monatoj ĝin instruis al blindulino, kiu ĉeestis la kongreson de Cambridge, s-o Prof. Offret, s-o Déronnière, s-ino Farges, s-o D-ro Madinier, s-o Sandelyon, k. a.).

La 18. julio, la grupo de Lyon akceptis s-on Casanovas (Tarrasa, Hispanlando) kaj s-on Fridrich (Kralavopole, Ĉeĥoslovakio), kiu faris paroladon pri la lando de la XIII-a.

Esperanto en Pola Lando.

BYDGOSZCZ Pro tuta elĉerpigo de la unua malgranda eldono de la konata Geneva „Manifesto“, necesiĝis dua eldono (10 000 ekz.). Mendoj sendotaj al Pola Esp. Servo, Bydgoszcz, Kordeckiego la. Prezo poekz. 15 pmk.

ŁUCK. Fervora propagando de s-ano Konderak, del. de UEA, inter ĉi tieaj oficistoj de ĉefestraro de la regionaj arbaroj. Dekkelkaj entuziasme lernas Esp. Same vigla propagando en ĉi tiea junulara societo „Sokol“ (skoltoj).

ŁÓDŹ. La 3-an de julio okazis solena disdono de diplomoj al 15 kursabsolvintoj ĉe la unua „Laborista Esp. Grupo“ en Łódź. Paroladis s-anoj I. Lejzerowicz kaj Zys.

RAKÓW. Instruisto s-o Gluchowski propandas sukcesplene inter instr. gazetaro, nome „Ogniwo Związkowe“ en Częstochowa, „Ognisko“ en Lublin kaj „Głos Nauczycielski“ en Warszawa.

WARSAWA. La 4.—8. julio okazis kongreso de instruistaro de polaj unuagradaj lernejoj (Związek Nauczycielstwa Polskiego Szkół Powszechnych). Ĉeestis kaj salutis la kongreson en nomo de „Federacio de Esperantistaj Societoj en Polujo“ kaj Esperantista Societo „Laboro“ s-o K. Domoślawski, kies vortoj trovis simpatian akcepton. Inter la delegitoj estis konata Esperantisto el Poznań, s-o Borkowski. Al ĉiu kongresano estis transdonita la de Pola Esp. Servo en pola traduko eldonita Geneva „Manifesto“. Estis disvenditaj kelkaj dekoj da lernolibroj. — La 11. julio

okazis konferenco de institucioj kaj societoj klerigaj ĉe la diversaj laboristaj organizaĵoj politikaj, metiaj ktp, malfermita de ĉefestraro de „Laboro“ s-o Roman Kešicki. Referaton pri „La pedagogia valoro kaj la ĝenerala-kleriga instruado de Esp.“ faris s-o D-ro Czubryński, reprez. de „Pola Esp. Instituto“. S-o K. Domoślawski parolis pri „La signifo de la Esp. instruado por la tuhomara kulturo kaj la internacia alproksimigo de la laborista klaso.“ Oni akceptis diversajn rezoluciojn kiujn ni ne povas publikigi pro manko de loko. *Pola Esp. Servo.*

Al malbonvalutuloj.

La denova terura falo de la germana kaj kiu ĝi de la aŭstra, hungara kaj aliaj valutoj kaŭzas denove gravan plialtiĝon de ĉiuj kostoj por ET. Ĉar ni bezonas garantian por plua ekzistado, ni devos denove grave plialtiĝi la prezojn por ĉiuj malbonvalutuloj. Ĉiu 4-paĝa ET-numero kostas al ni mem nuntempe meznombro ĉ. 10 gmk. (t. e. proksimume 30 hung. kr., 100 pol. mk., 700 aŭstr. kr.), kaj kostos post 1. sept. supoze pli ol 15—20 gmk. Certe, granda parto de la bonvalutuloj pagas pli multe ol 10 resp. 15 gmk. Sed 1. apenaŭ unu triono de la ET-abonantoj estas bonvalutuloj; 2. nur de malmultaj bonvalutuloj ni ricevas la plenan prezon nomitan sur la titolo (parte ni ricevas nur 30—40% de la plena prezo, pro la rabato al revendistoj, pro perdiĝintaj aŭ nevenditaj ekzempleroj), ne kalkulante tiujn senhontajn revendistojn, kiuj trompas nin pagante neniom; 3. de multaj malbonvalutuloj ni ricevas eĉ ne la kostojn por papero kaj afranko, ekz. de multaj aŭstroj, hungaroj, rusoj kaj germanoj, almenaŭ kio koncernas la „opan vendadon“; kaj 4. estas neĵuste pretendi, ke la malbonvalutuloj pagu maksimume la kostojn por papero kaj afranko kaj ke la bonvalutuloj pagu ĉiujn ceterajn kostojn. Ni atentigas ankoraŭ, ke ĝuste inter la neesperantistaj gazetvendistoj ekzistas multaj trompuloj, de kiuj ni vane atendas pagon.

Laŭ tio estas antaŭvideble, ke post 1. septembro ni devos grave plialtiĝi la prezojn por ĉiuj malbonvalutuloj kaj ke ni devos ĉesigi la opan vendadon en Germanujo, Aŭstrio kaj Hungarujo, escepte en tiuj urboj, kie oni speciale deziras daŭrigi ĝin pro la propagando kaj kie oni povos garanti al ni la pagon.

Al tiu afero ni revenos en nia venonta numero.

Ne preterlasu partopreni la
POSTKONGRESON
kiu okazos en
STOKHOLMO
kaj la postan viziton al urbo
KOPENHAGO!!

Gazetaro.

Nacilingvaj gazetoj kun artikoloj pri Esperanto. La Vita, monata revuo de itaj fervoistoj, Mantova, julio. (Bona artikolo pri Esperanto de s-o Franco Ramolfo, kun favora postskribo de la red.) Illustrazione del Popolo, Torino, Ital., 25. 7. (Art. „L'Esperanto“ de Francesco Pizzi) Sheffield Weekly, 10. 6. (Art. kun portreto de s-ano Merchant) Burnley News, 10. 6. (Detala raportoj pri la Brita Esp. Kongreso.) Daily Telegraph, London, 12. 6. (Pri la cirkulero de franca ministro por publika instruado.) Journal of Education, London, 1. 6. (Esp. konferenco en Geneve.) Corriere Italiano, Berna, Bern, Sviz., 24. 6. (Favora artikolo.) Nieuwe Hengelose Courant, 22. 7. (Art. pri franca aŭ Esperanta lingvo en mezlernejoj.) Nieuwe Rotterdammer Courant, 19. 7. (Esp. en lernejoj de Albanio); 4. 7. (Esp. ĉe japana parlamento.) La Metropole, Antwerpen, 8. 7. (Malfavora art.) La Gazette de Lausanne, 9. 7. (Bonega art. por Esperanto de René de Saussure [?], represetita de la Feuille d' Avis de Lausanne.)

Esperanto kaj la franca gazetaro.

La konata cirkulero de la ministro de publika instruado havis la neatenditan rezultaton atentigi la francan gazetaron pri Esperanto kaj krei polemikadon en la gazetoj Dum la lastaj ses semajnoj jenaj parizaj gazetoj parolis pri Esperanto:

F a v o r e: Siècle, L'Action, L'Ère Nouvelle (3 artikoloj, 2 karikaturoj), L'Oeuvre (5 art., 1 karik.), L'Avenir (art. de s-o Chaumet, eksministro), L'Humanité, La France Economique et Financière, Les Echos (eksporta revuo), La Lanterne, L'Internationale (dufoje), Le Journal du Peuple, Le Populaire, Le Radical.

M a l f a v o r e: Le Figaro, L'Echo de Paris, L'Intransigeant, L'Éclair, La Libre Parole, Le Gaulois, Paris-Midi, Journal des Débats, La Liberté

S e n p a r t i e: Le Matin, Le Petit Journal. „Le Matin“ publikigis laboran al Esp. leteron de s-o Aulard, prof. de historio en la pariza universitato (17. 7.). Kelkaj ĵurnalistoj intervisis s-on Rollet de l'Isle, prez. de SFPE, kaj Archdeacon, vicprez. de la pariza grupo.

Ankaŭ provincaj gazetoj prilaktis la cirkuleron. Le Cri du Nord, Le Télégramme du Nord (ambaŭ en Lille), Le Journal d'Étiampes, Le Revue Démocratique de Maine et Loire (Angers), La République de l'Oise, kaj Le Moniteur de l'Oise (ambaŭ en Beauvais), La Dépêche de Toulouse, 14. 7. ĉefartikolo, Le Peuple de la Loire (St Etienne) kaj aliaj parolis favore aŭ senpartie.

Ricevitaj nacilingvaj gazetoj sen artikoloj pri Esp. Eugenia, Barcelona, jul.-aŭg. Der Bund, Frankfurt, 29. 7. Messezeitung, Reichenberg, Ĉsl., julio.

Pro la longa artikolo pri Helsinki kaj pro la Laborplano de la XIV-a (sur la anonca paĝo) ni ne povis publikigi en la hodiaŭa numero la kutiman literaturan parton. Oni bonvolu pardonni!

Recenzejo.

LIBROJ.

PENSEROJ. Unua Kajero. Kompilis kaj tradukis Salo Grenkamp. Rekomendita de E. L. A. 10 : 14 cm. 25 pg. 1922. Eldonejo: Oskar Ziegler & K-jo, Marktredwitz (Bavarlando); por Polujo: Eldonejo Esperantista Voĉo, Jaslo. — Prezo: broŝur. 5 gmk. (por mezvalutaj landoj 8 gmk., por bonvalutaj 1. 10 gmk.)

La tradukinto kolektis pli ol 150 proverbojn, sentencojn kaj alforismojn pri edukado, moralo, etiko, laboro, vivo, morto, destino, sorto, amo, homamo, edzezo ktp., kiujn li lerie kompilis en bela arango. Legante en la libro ni renkontas bonajn amikojn el la tuta mondo. — La traduko estas bona. Espereble la tradukinto donacos al ni plualn verkojn. *G. Ajul.*

FIANCIĜO. S-o Virginio Laugier anoncas sian fianciĝon kun f-ino Itala Ferrari, Via Principe Tomaso n-o 13, Torino 6 (Italio).

DANKO. S-o Léon Agourline el Parizo dankas pro afabia akcepto: La redakcion de „Esp. Triumfonta“ kaj s-ojn Hurler kaj Junker en Köln, s-on Bultin en Godesberg, Gilck, Schwarzschild, Vichert kaj ges-ojn Rumpel en Berlin, ges-ojn Freund, Habellok, pasiron Becker kaj la prez. de la Esp. junularo en Breslau.

Nederlanda Anonima Societo Luksa-pano Fabriko

antaŭe Henri J. Carels.
50 Butikoj:
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.

Lunĉejo Carels

(ĉefo: H.A. Scharwächter)
63 Weimarsstraat, Den Haag.
Oni parolas Esperanton.

Esperanto Service Corporation

„Esko“
500 Fifth Avenue New York City
Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado
de ĉiuj specaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke
ricevataj

Nova intern. Esperanto-Literaturo.

Jus aperis:

Bennemann: **Tra la Mondo.**
Dua parto: por progresintoj
144 paĝoj kun aparta eldono de kvar komponaĵoj.
Kartonila eldono mk. 70.—

Bennemann:
Internacia Kantaro.
Kolekto de 64 popularaj kantoj el 26 nacioj.
Kun eldono de 3 famaj Koncertarioj de
Händel-Mozart-Wagner.

3-a eldono de la Esperantista Kantaro. 11-a—15-a miloj.
Muzika eldono, aranĝita de J. Aĉtielik, lama
orkestestro de la opero en Leipzig.
Tekstaro, broŝur. mk. 20; Muzika eldono, broŝur.
mk. 40.—; bindita mk. 55.—

... ml tre admiras ambaŭ verkojn kaj forle rekomendas ilin!
W.M. Page.

Internacia Mondliteraturo

Kolekto de la plej famaj verkoj el ĉiuj naciaj
literaturoj.

Sub la gvidado de Prof. D-ro J. Dietherle, estro de
la Esperanto Instituto por la Germana Respubliko.

Nova Formato — Nova Eksterajo.

Vol. I. Goethe. *Hermano kaj Dorotea.* Eposo idilia. El la germana originalo trad. B. Küster. 2-a korektila eldono. Kun enkonduko kaj antaŭparolo de Prof. d-ro J. Dietherle. Kart. eldono mk. 40.—

Vol. IV. Raabe. *La nigra galero.* El la germana originalo trad. Prof. d-ro F. Wicke. 2-a korektila eldono. Kart. eldono mk. 40.—

Vol. VII. Chamisso. *La mirinda historio de Petro Schlemihl.* El la germana originalo trad. E. Wülster. Kart. eldono mk. 40.—

Vol. VIII. Stamatov. *Nuntempaj Rakontoj.* El la bulgara originalo trad. Ivan H. Krestanoff. Kart. eldono mk. 40.—

Stranga Heredaĵo.
Romano originalo verkita de H. A. Luyken,
F. B. E. A.

520 paĝoj. Broŝurita eldono mk. 120.—; bindita el-
dono mk. 150.—.

Tiu tria verko de l' konata aŭtoro estas romano, plena de okaz-
intaĵoj kaj allogaĵoj, plena de senceloj! La enhavo kondukas
la leganton tra ĉiuj mondpartoj, prilaktante religialn kaj socialajn
demandojn, pacifismon, nacismon; komercialn, teknikaln kaj
artistal demandojn, okultismon kaj spiritismon.
Vere esperantista tendencromano, kiu ligas la libran valoro al
ĉiuj gesamsideanoj, kaj kiu aliflan ilian spektaklan intereson per
ĝia modala kaj flua stilo.

La prezoj estas la nuntempaj (aŭgusto 1922);
ŝanĝoj estas rezervataj. Bonvolu alkalkuli la lau-
leĝan valuto-alpagon, t. e. 60⁰⁰ por la mez-
kaj 100⁰⁰ por la bonvalutaj landoj. Al antaŭpagata
mendo aldonu 20⁰⁰ por sendespezoj!
Esperanto-Katalogo laŭ peto.

Ferdinand Birt & Sohn, Esperanto-Fako,
Salomonstr. 15 Leipzig Salomonstr. 15

Laborplano de la Dekkvara.

Oni postulu la "Victoria"-Eksport-prezliston en germana-hispana au germana-angla lingvoj.



INTER-NACIAJ FOIROJ DE FRANKFURTA. M.

Aŭtuna foiro de 8-a ĝis 14-a oktobro 1922.

Ampleksa specimena ekspozicio. 30 branĉoj sur unu tereno. Masi-vaj foirdomoj. Uzu niajn pres-ajojn kiel reklamon por ni kaj sam-tempe por Esperanto! — Petu regulan alsendon de informoj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. M.

Butin & Jung,

Godenberg, Bahnhofstr. 30. (Germ.) rekomendas i. a.:

Andersen, Bildolibro	gmk 21.60
Argus, Pro kio?	25.—
Baranski, Tagigo	10.—
Grillparzer, Monaĥejo	8.—
Heyse, Edziĝa festo	8.—
Hoffmann, Struvelpetro	40.—
Möbusz, Dokumentoj de Esperanto	40.—
Jung, Lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	40.—
Raabe, Nigra galero	25.—
Seidel, Vintro-fabeloj	20.—

Por sendkostoj aldonu 20 proc. — Mendu ĉi antaŭ nova prezaligo, ĉar la prezoj aliĝas laŭ la valuto! — Laŭlega pli-pago por mezbonvalutuloj 60 proc., por bonvalutuloj 100 proc.

Sojunge Horrem ne akceptas mendoln por nia firmo!!!

HUNGARLANDO.

Komercajn komisionojn kaj reprezentadon

de diversaj komercaj akceptas, tradukas ĉirklulojn kaj leterojn el Esperanto en hungaran lingvon, prizorgas la anonc-adojn kaj la dissendadon de ĉirkluloj en Hungarlando, Inter-saĝas kaj vendas poŝtmarkojn poŝtgrade kaj pomalgrade

Rudolfo Batitz, Budapest VIII., Népszuház-u. 12.



III. Internacia Foiro de Reichenberg

Cehoslovakio
12. 20. aŭgusto 1922

Plej granda teksa mer-kato de la kontinento. Ekspozicia specimena eks-pozicio de bohemiaj vit-roj, ceramikoj, Galbonz-aj ĉambreroj, masinier-kato, papertoro, teknika kaj kemiaj produktadoj. Metalaj, ledaj, lignaj komercotaj ludiloj, lokaj specialaĵoj.

Generala ekspozicio de komercitoj. Rabatitaj veturprezoj. Faciligo por eniro en Cehoslovakion. Esperanto uzata.

Messeamt Reichenberg (Esperanto-fako) Cehoslovakio.

Fabrikaĵojn

ĉiusekajn deziraĵojn el Germanio vi akcelas je fabrikkprezoj per la

Komercista Esp.-Grupo, Mainz a. Rh. Oficejo: Augustinerstrasse 58. — Germanio.

Vojaĝartiklojn malmultkoste

vi akcelas en la magazeno de nia samideano

Ferd. Stiegler, Mainz a. Rh., Germ. Bahnhofstrasse 58.

Fabrike por delikataj ledajoj, kofroj, valizoj, paperoj kaj vojaĝartikloj.

Oni parolas kaj korespondas Esperante.

La malgranda glaciiga kaj malvarmiga maŝino

„ARKTIS“

estas fabriko de la firma

JULIUS RÖMHELD, Mainz a. Rh. (Germanlando) Ferfandejo, ferkonstruejo kaj maŝin-fabriko.



Kiel vi aspektas?

Ĉion vidos viaj korespondantoj, se vi sendos al ili vian foton!

Lasu multoblige vian portreton!

Mi estas pli malmultekosta ol via fotografisto.

	Pecoj:	20	50	100
Poŝtkartoj (brom-argenta) nigra		120.—	200.—	300.—
" " " bruna-sepia		140.—	250.—	400.—
" " " (lumpresaj)		—	—	180.—
Glumarkoj (poŝtmarka formato)		40.—	80.—	120.—
" " (formato 4 1/2 x 3 1/2 cm)		80.—	160.—	250.—
Pasportbildeto (formato 4 x 5 cm)		70.—	120.—	220.—
Vizitkartoj kun portreto		—	—	100.—
" " nur kun nomo		—	60.—	80.—

La prezoj estas en germanaj markoj. — Krom tio 20% por sendkostoj. — Liverado nur kontraŭ antaŭa pago!

Arta Laborejo por Amasaj Multobligoj Ferna Versand, Plauen i. V., Germ.

RUSOJ, SIBERIANOJ, persoj, georgoj, kaŭkazanaj, ukrainoj atentaj! — Sendu al ni vian fotografon kaj 50 nedifektajn, pieble malsamajn, neuzitajn kaj stampitajn poŝtmarkojn de via lando, kaj vi ricevos de ni 50 glumarkojn aŭ 12 belajn poŝtkartojn kun via portreto. — Ferna-Versand, Plauen i. V., Germanujo.

HOROJ

Tagoj	HOROJ															
	8	9	10	11	12	1	2	3	4	5	6	7	1/2	8	9	10
Mardo 8 VIII	Matenmanĝo.	KKK ¹⁾ Komisiono pri Internacia Organizado. Laŭ nacioj laŭ speciala horaro. Blinduloj.				Tagmanĝo kaj refreŝigo.		Skriba ekzameno por S. D. ²⁾ Sciencistoj. Vegetaranoj. Stenografistoj. Juristoj. Katolikoj. Kristanoj. Skoltoj.			Vespermanĝo kaj refreŝigo.		Akcepta Interkonatiĝo en Studenta Domo.			
Mer-kredo, 9. VIII.	Matenmanĝo.	Diservoj divers-relig. Liberpens. Framasonoj. Teozofoj. Spiritistoj.		Solena malfermo en Finna Nacia Teatro.				Tagmanĝo kaj refreŝigo		Anoj de LK ³⁾ Sporta propaganda parolado. Sportistoj. Sciencistoj. Laboristoj. Parolado de Harvea. Bontemplanoj.			Koncerto de „Suomen Laulu“ (Miksita horo) en Universitato.			
Ĵaŭdo, 10. VIII.	Matenmanĝo.	I-a Laborkunsido Foiroj.				Tagmanĝo kaj refreŝigo.		I-a KUNSIDO de UEA.		Vespermanĝo kaj refreŝigo.		Festo en Nacia Teatro. ⁴⁾				
Ven-dredo, 11. VIII.	Matenmanĝo.	II-a Laborkunsido. Foiroj.				Tagmanĝo kaj refreŝigo.		Fotografado. Ekskurso al la Prezidenta akcepto. Filmado.		KOMUNA TAGMANĜO.						
Sabato, 12. VIII.	Matenmanĝo.	II-a KUNSIDO de UEA.				Tagmanĝo kaj refreŝigo. Inĝenieroj-teknikistoj. Pacifistoj.		Pacifista festo. Instruistoj. Kuracistoj. Poŝtistoj. Fervojistoj. Propagandistoj. Malgr-nacianoj.		Vespermanĝo kaj refreŝigo.		Koncerto de Laborista Virhoro en Studenta domo.				
Dimanĉo, 13. VIII.	Matenmanĝo.	Diservoj diversekleziaj. Ekskurso al Imatra. Teozofia festo en Hadeso (Tuonenkylä). Koncerto de Hanna Granfelt. Ekskursoj al ĉirkaŭaĵo de Helsinki.														
Lundo, 14. VIII.	Matenmanĝo.	III-a Laborkunsido.				Tagmanĝo kaj refreŝigo.		Anoj de LK Laboristoj. Komerlistoj. Studentoj. Filatelistoj.		Vespermanĝo kaj refreŝigo.		KOSTUMBALO. Ekzamenoj por S. D. Konferenco de Esperanto-Institutoj.				
Mardo, 15. VIII.	Matenmanĝo.	III-a KUNSIDO de UEA.				Tagmanĝo kaj refreŝigo.		Propaganda festo de Abstinuloj. Instruistoj. Kuracistoj. Ĵurnalistoj. Kooperativanoj.		Vespermanĝo kaj refreŝigo.		PROPAGANDA FESTO de Laboristoj.				
Mer-kredo, 16. VIII.	Matenmanĝo.	Solena Fermo en Studenta domo.				Tagmanĝo kaj refreŝigo.		EKSKURSOJ. — FORVOJAĜO.								

Dum la Kongreso: Artekspozicio en Artpalaco de Stenman kaj en Artsalono Strindberg.

¹⁾ Konstanta Komitato de la Kongresoj.

²⁾ Supera Diplomo.

³⁾ Lingva Komitato.

⁴⁾ En la programo i. a. estas: Popolaj kantistoj kaj ludistoj prezentos programon en Kalevala maniero; popolaj kantoj ĉe akompano de „Kantele“; teatraĵo „Fianĉiĝo“ de fama finna verkisto A. Kivi.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postami 84
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝt-ĉeka n-o 284 20.

Brazila: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.

Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Soĉa

Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.

Estona: Est. Esp. Unulĝo, poŝtkast 6, Tallinn.

Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.

France: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.

Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.

Hungara: Paŭlo Balkanyl, Hajos-uica 15-II-2, Budapest VI.

Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.

Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.

Latva: Talivaldo Indra, Riga, Pasta kaste 475.

Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).

Nederlanda: J. Ravestein jr., v. Aerssenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝtĉeka konto Haag n-o 2578.)

Pola: Adolfo Oberroiman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.

Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

NASKIĜO. — Al niaj samideanoj ges-oj O. Sklenčka en Hradec Králové, Cehoslovakio, naskiĝis filineto.

LA SKANDINAVA ESP. GAZETO „Esperanto, la universalrimedo de la mondopaco“ (en dana lingvo), estas havebla nur ĉe s-ino Magda Mammen en Grenaa, Danlando, del. UEA. — Jarabono 4 dan. kronojn.

EN TORINO (Italio) la somera kunveno de la tuta Esperantistaro estas la bierejo Boringhieri (Corso Vittorio Emanuele), la unuan kaj trian mardon de la monatoj je 21 h.